

Resumo de estraraj voĉdonoj en ILEI, 2011

La donitaj datoj ĉiam rilatas al la dato de la lanĉo de la voĉdono.

EST 2011-1: Rerezentantoj: (20 Jan)

La estraro konstatas ke la pluekzisto de pluraj reprezentantoj estas en dubo, sed ĉar la koncerna parto de la regularo estas nun modifata kaj verŝajne estas jam modifita, decidas procedi jene:

- 1.1 Aperigi en IPR la nunan liston de 14 reprezentantoj plus la nova por Bulgario, pri kiu la estraro jam favore voĉdonis, eventuale kun piednoto ke la listo estas sub revizio.
- 1.2 Taskas la sekretarion raporti al la estraro la precizan kialon pro la elimino de ĉiu reprezentanto, kun laŭeble indiko, kiomlonge tiu kialo ekzistas.
- 1.3 Taskas la sekretarion starigi kunlabore kun aliaj estraranoj, intensan programon por forigi ĝis la 31a de marto 2011 la kialon por la proponata forstreko
- 1.4 Je la menciita dato la estraro ricevos aktualan raporton kaj decidus tiam kiel procedi.

La voĉdono ne estis kompletigita, ĉar pli bona solvo estis trovita. Rezulto estas, ke en IPR 2011/1 aperas 8 reprezentantoj. Tri estis restarigitaj pere de Koleghelpa Kaso; estis nur pretervido, ke tio ne okazis komence de 2011. Aliaj fariĝas 'Kontakt-personoj', pro estrara laboro du estas intertempe restarigitaj, ceteraj ankoraŭ prilaboratoj. Ĉi tiu sekretaria tasko rilati kun sekcioj fariĝas tasko de la restantaj estraranoj, ĝis la elekto de nova sekretario.

EST 2011-2 Aŭspicio por seminario en Bulgario (20 Jan.)

La estraro konsentas permesi al la aranĝo en Bulgario en junio 2011 uzi la siglon kaj nomon de ILEI kiel "kunorganizanto", akorde kun la kondiĉoj starigitaj en la mesaĝo de la prezidanto al prof. Leonov de Jan 19, 2011.

AKCEPTITA SEN KONTRAŬO

EST 2011-3 Estrarkunsido en Münster (20 Jan.)

Ni estrarkunsidu en la Germana-Nederlanda kongreso, Junio 11-14, en Münster.

MALAKCEPTITA.

Maleblus havi tie kvorumon. Anstataŭe, propono pri Nederlando 16-18 aprilo estis aprobita, kaj efektive estis kvoruma. ILEI aktivos en la german-nederlanda kongreso, sed sen estrarkunsido.

EST 2011-4 Volontula laboro (27 Jan.)

La estraro fiksas bazan kompenson de 5 EUR hore por volontula laboro, se ne estas farita alia interkonsento.

AKCEPTITA SEN KONTRAŬO

Piednoto: Honorarioj estas por volontuloj ekster la estraro, ne por estraranoj plenumantaj siajn estrarajn taskojn. Honorarioj por redakta laboro estas aparte fiksitaj, kutime je popaĝa bazo. Buĝeto 2011 havas sufiĉon por pagi 20 horojn semajne tra 6 monatoj je tiu tarifo.

EST 2011-5 Koleghelpa Kaso (27 Jan.)

La estraro konsentas decidi pri 32 membroj por la Koleghelpa Kaso, kun prioritato protekti sekciojn kaj indajn reprezentantojn. La listo estu intern-vikie aperigita. Post atingo de 32 la Estraro revenos al la demando, rigardante la staton de la konto. ILEI tuj faru alvokon por donacoj.

MODIFITA. La kasisto atentigas, ke 32 komplete malplenigus la kason kaj konsilas kontraŭ tio. La estraro per posta diskuto rajtigas aljuĝon de 25 lokoj. (plejparte intertempe faritaj). La bezono kreskas ĝis 55 au 60.

EST 2011-6 Ekzamena sesio (27 Jan.)

La Estraro aprobas eksterkutiman session de la ekzamenoj UEA/ILEI en Meksikio, kun unu kandidato kaj unu ekzamenanto, por ebligi la baldauan komencon de oficiala universitata kurso.

AKCEPTITA SEN KONTRAŬO

Rezulto: La sesio okazis, kun tri kandidatoj. La kurso povis eki.

EST 2011-7 Aliro al reta IPR (15 Feb.)

La estraro decidas, ke ĝis julio 2011, la estraranoj kaj sekciestroj de la ligo ricevu pro-ofice aliron al la retaj versioj de IPR. Aliaj paperaj membroj rajtas kontraŭ peto, ricevi retaliron sen plia pago.

REZULTO: 5 JES, 1 ne-respondo (6 estraranoj)

Disponigo al sekciestroj permesas transigi al ili grandan parton de la laboro prizorgi la grandan kvanton de malsukcesoj ĉe la livero de la mesaĝo kun la aliraj informoj (ĝis 40% kelklande). La komitato debatu pri la decido doni al paperaj membroj la rajton aliri la retan version.

=====

DECIDOJ 8-14 faritaj en Skajpa kunsido de la estraro – 2 mar.

Ĉeestis: Estraranoj Duncan Charters, Stefan MacGill, Zsófia Kóródy, Julija Batrakova kaj (nur skribe) Radojica Petrović.

EST 2011-8 Enkondukoj por IPR (2 Mar.)

2011/2 Rade (konferencaj+simpoziaj preparoj); 2011/3 Duncan (konferencaj rezultoj), 2011/4 Zsofia, (evoluo en Herzberg kaj/aŭ ekzamenoj).

AKCEPTITA SEN KONTRAŬO

EST 2011-9 Sekretarieja retadreso (2 Mar.)

Konsentite anonci novan laŭofican retadreson; ilei.sekretario@gmail.com

Intertempe pli ol unu persono plenumos la taskojn. La fizika adreso estos ĉe ICH, kie okazos la taskdividado.

AKCEPTITA SEN KONTRAŬO

EST 2011-10 Modifoj al Statuto kaj Regularo (2 Mar.)

La estraro decidas pri principaj punktoj, cele al propono de nova teksto al la Komitato.

- Ŝanĝu la terminon 'Estraro' al 'Liverteamo' (bezonus Statut-ŝanĝon). **Malakceptita.**
- Modifu difinon de 'Individuaj membroj': Ĉiuj kiuj ne aliĝas tra sekcio. **Akceptita**, sed kun regulara deklaro, ke la kutima vojo al membriĝo estas tra sekcio se ekzistas.

- Forigu la rajton de individuaj membroj nomi komitatanojn (neniam reale okazis). [Akceptita](#).
- Konfirmu pri modifo de la membro-postuloj por ekesti sekciestro, reprezentanto. Akceptitaj en 2006 kaj 2009. Komitato estis voĉdonanta. [Akceptita](#). [Komitato poste akceptis](#).
- Definitiva forfaligo de la alineo pri rotacia elekto de estraranoj (proponita 2001, efektivigita en la konferenco de 2003). [Akceptita](#).

ĈIO KROM UNU AKCEPTITA SEN KONTRAŬO

EST 2011-11 Regularo pri Honoraj Membroj (2 Mar.)

Konsentita proponi al la komitato malgrandan modifon de la regularo de HM por permesi honorigon de forpasintoj, laŭ teksto sendita 1 mar, 2011. Propono starigi tempolimon por tio restas decidota en la fizika estrarkunsido.

AKCEPTITA SEN KONTRAŬO

EST 2011-12 Kontakt-personoj (2 Mar.)

Konfirmata la jama decido establi la kategorion 'kontakt-persono'. Tio helpas al ILEI ekagi en novaj landoj, sen statutaj kaj financaj obstakloj.

AKCEPTITA SEN KONTRAŬO

EST 2011-13 Jarstatistiko 2010 (2 Mar.)

Proponata stato kun 756 membroj dissendita 1 mar; konsentite aperigi la datumojn por 2009 kaj en nia retejo, kun fina akcepto okaze de la estrara raporto.

AKCEPTITA SEN KONTRAŬO; la dokumento afiŝita baldaŭ post la decido.

EST 2011-14 Konferenco 2011 (2 Mar.)

Konsentite longigi la limdaton por la nunaj prezoj de la 31a de marto, 2011 ĝis la mezo de aprilo. Konsentite aperigi en nia retejo la liston de aliĝintoj (sen adresoj).

== fino de la Skajpa kunsido =====

EST 2011-15 Starigo de mult-lingva retejo (4 Mar.)

La Estraro aprobu la starigon de multlingva retejo por ILEI, paralele kun la nuna Esperantlingva retejo, laŭ la teknika sistemo uzata de la germana sekcio AGEI, ICH (Internacia Centro Herzberg) kaj aliaj, kiel detaligita en aparta mesaĝo: La starigo-kostoj estos ĉ. 360 euroj, kaj jara abono kaj flego averaĝe 130 euroj, varianta laŭ la kvanto de flego necesa.

4 POR, 2 SINDETENOJ. Respekte al la sindetenintoj, la demando restis malferma ĝis la fizika kunsido de la estraro du semajnojn poste.

EST 2011-16 Protokolado kaj Helpo en la Konferenco (4 Mar.)

La estraro konsentas inviti al la ILEI-konferenco s-inon Teresa Liberska el Pollando, pagante la program- kaj loĝ-kostojn, kaj taskas ŝin helpi en la konferenca programo ĝenerale, kaj specife por protokoli la komitatajn kaj eble pliajn kunsidojn.

4 POR, 2 SINDETENOJ. Respekte al la sindetenintoj, la demando restas malferma.

EST 2011-17 ILEI en TAKE (4 Mar.)

La estraro komisias al Dunacan Charters, Katalin Kovats kaj Petra Smideliusz reprezenti la ligojn en TAKE, la Tut-Amerika Kongreso en julio 2011, kaj al Petra diskonigi la agadon de ILEI en la landoj de sud-ameriko kiujn ŝi vizitos, kaj precipe helpi nin strarigi reprezentantojn kaj sekciojn el landoj, kie tiuj mankas.

5 POR, 1 voĉo probable perdiĝis.

Postnoto: La nomitoj reprezentos TAKE kune kun la sekciestro de la Brazila sekcio (la gastiganta lando) kaj eventuale pliaj sekciestroj de la ligo, kiuj partoprenos.

EST 2011-18 ILEI en OSIEK (4 Mar.)

La Estraro komisias al Teresa Liberska reprezenti la ligojn en la Kongreso de OSIEK en Ĉinio en aprilo 2011.

5 POR, 1 voĉo probable perdiĝis.

Decidoj el la Estrarkunsido de ILEI, 16-18 aprilo, 2011

La estraro de ILEI, kun 5 el la 6 estraranoj venintaj al Roterdamo faris decidojn :

EST 2011-19 Multlingva retejo (18 Apr.)

La Estraro aprobis la starigon de multlingva retejo por ILEI, en la limoj de buĝeto 2011. La retejo komence havos provperiodon. La nova kaj la nuna retejoj ekzistos paralele, ĉar ili celas malsamajn publikojn.

EST 2011-20 Konferenco 2012 (18 Apr.)

Decidite, ke la Konferenco en 2012 okazos en Ĉinio, surbaze de la sola ricevita invito. Tio skizis eblojn en kvar urboj, el kiuj du estas preferataj: Xian en *Shanxi* provinco kaj Kunming en *Yunnan* provinco. ILEI kaj la ĉina sekcio elektos ene de majo la urbon kaj datojn (depende de findecido pri la UK-datoj). Tiel ni aperigu informojn, kotizojn kaj aliĝilon antaŭ Kopenhago.

EST 2011-21 Apogo por seminario kaj ekzamenoj (18 Apr.)

La Estraro konfirmis financon apogon el la Afrika Kaso de ILEI por la aprila seminario kaj ekzamensesio en Rumonge, Burundo, por mildigi la kostojn por partoprenantoj, kaj faris samon por evento en Kinŝaso, Kongo DR, kadre de la jara disponigo de UEA por edukaj agadoj.

EST 2011-22 Apogo por TAKE (18 Apr.)

Konfirmataj, laŭ la sama bazo, estas financaj rimedoj por postsekvi la rezultojn el Matanzas; temos pri edukaj agadoj kadre de la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE) okazonta en Sao Paulo en julio 2011.

EST 2011-23 Apogo por UAM (18 Apr.)

La Estraro konfirmis sammaniere subtenon por la tri-jara kursaro pri interlingvistiko en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano; egalaj kontribuoj de UEA kaj ILEI permesas la anoncadon de kvar stipendioj kun valoro de po 250 euroj.

EST 2011-24 Apogo por la Simpozio en Kopenhago (18 Apr.)

Fortigitaj la ebloj liveri altkvalitan simpozion kadre de la 44a ILEI-konferenco, kunlabore kun la Universitato de Kopenhago kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), pere de disponigo de mil-eura subteno el la disponigo de UEA.

EST 2011-25 Membrokartoj (18 Apr.)

Formulis manieron liveri membrokartojn al tiuj sekcioj aŭ homoj, kiuj deziras tion, kun minimumaj plusaj kostoj aŭ labordevoj je la internacia nivelo.

EST 2011-26 Koleghelpa Kaso - pluiro (18 Apr.)

Decidis plue limigi la apogon por membrigo de personoj per la Koleghelpa Kaso al la jam deciditaj 25 ricevantoj; la plia dudeko da dezirantoj atendu pozitivajn reagojn al refoje farataj alvokoj por apogo.

EST 2011-27 Anstataŭantoj rete anonceblaj (18 Apr.)

La Estraro konsentis inaŭguri retan anoncadon de anstataŭantoj por la komitataj kunsidoj en Kopenhago, kondiĉe, ke la anstataŭanto kunportu subskribitan paperan version de la rajtigilo al la konferenco.

EST 2011-28 Temo por Tago de la Lernejo (18 Apr.)

La estraro fiksas temon por la Tago de la Lernejo en Kopenhago: "Edukado al Interkompreno", kaj serĉas anticipan kunordiganton kaj surlokan gvidanton.

EST 2011-29 Sekretario serĉata (18 Apr.)

La Estraro konsentas peti al la elekto-komisiono serĉi kandidatojn por la vaka sekretaria loko, cele al elekto en Kopenhago, kaj konfirmas la novan laŭofican retadreson: ilei.sekretario@gmail.com.

EST 2011-30 Kontoj 2010 (18 Apr.)

La estraro kun danko al la kasisto ricevis kaj trastudis provizoran finkalkulon de la kontoj 2010, kaj petis ŝin liveri finan kalkulon ĝis la fino de majo kaj zorgi pri la revizado.

EST 2011-31 Honoraj membroj (18 Apr.)

Konsentite, ke la tempolimo por proponi honorigon por forpasinto estu du jaroj ekde la forpaso.

EST 2011-32 Kontakt-personoj (18 Apr.)

La estraro konsentas akcepti kontaktpersonojn por Haitio kaj Bolivio kaj daŭre serĉi pliajn.

EST 2011-33 Scienca Komitato de IPR (18 Apr.)

La estraro ricevis la proponitan tekston, sed trovas ĝin tro longa por trakti dum la kunsido; ĝi decidas ke la propono, ke SK-anoj ricevu senpagan membrecon en ILEI estas finance maloportuna; SK-anoj estu membroj de ILEI; kiu valore laboras ricevu kompenson, se necese, kadre de la buĝeto por IPR. Kun tiu decido kaj kelkaj pliaj atentigoj, la Estraro pludonas la tekston al la Komisiono pri Universitata Agado.

Komento: Posta ideo estas tamen krei koncizan regularon por proponi al la Komitato, kaj la ricevita teksto estu prilaborita de la Komisiono por fariĝi kompletiga gvidilo.

EST 2011-34 “La monde diplomatique” en Esperanto ricevu subtenon en projekto esperanto125 (18 Apr.)

La estraro konsentas ke la Esperanta versio de tiu altkvalita eldonaĵo ricevu diskonigon kadre de la projekto ‘esperanto125’, laŭ la propono de la Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Necesas tamen indiki, ke ILEI ne ligiĝas al la opinioj aŭ starpunktoj esprimitaj en la eldonaĵo.

EST 2011-35 Buĝeto apronbita por esperanto125 (18 Apr.)

La estraro akceptas la malnetan buĝeton kreitan por projekto125 kaj komisias al la realigantoj disanonci ĝin kadre de la serĉo por partneroj.

EST 2011-36 Proponataj kotizaltigoj por 2012

La estraro, rigardante la deficiton en buĝeto 2012, kaŭzata de la intensigo de la agado kaj reala financa subtenado de multaj bezonataj iniciatoj, proponos al la komitato en Kopenhago altigon de la membrotizoj kaj abonoj por Juna amiko, kiuj ekvalidu por 2012 ekde la 1a de januaro 2012:

- A-landa membreco de ILEI kun papera IPR altiĝu de 18 al 20 euroj (B-lande de 9 al 10)
- A-landa membreco de ILEI kun reta IPR altiĝu de 8 al 10 euroj (B-lande de 4 al 5)
- A-landa abono al *Juna amiko* altiĝu de 14 al 16 euroj. (B-lande de 9 al 11; kvanrabate tiuj fariĝu 12 kaj 9 respektive).

La estraro konstatas, ke la A- kaj B-landa disdivido ne plu adekvate prezentas la mondon, kaj studos la nunan tri-nivelan sistemon de UEA cele al iama ŝanĝo.

EST 2011-37 Konferenca libro – kun la jarraporto

Decidite, ke la estrarano pri konferencoj redaktos la Konferencan libron, antaŭvideble presanta ĝin en Beogrado, se alia pli favora oferto ne troviĝas. Laŭeble aperu du-lingvaj resumoj de ĉefaj prelegoj. Decidite plie, ke la jarraporto de ILEI, kompilata de la prezidanto, aperos fizike tie, aldone al ĝia elektronika versio. Limdato por pretigo (kune kun financaj rezultoj 2010): frue en junio.

----- fino de la estrarkunsidaj decidoj 16-18 aprilo 2012 -----

EST 2011-38 Prezo de nova libro (12 majo)

La prezo de la kuneldonita libro *Detala Gramatiko de Esperanto* ĉe ILEI estu 12 EUR.

AKCEPTITA SEN KONTRAŬO

Komento: La plena stoko de 166 ekz. nun atingis ILEI, 156 restas en Herzberg.

----- fino de decidoj 13 Majo 2011, SMG -----

Decidenda: La 1000 eura subteno por RITE (la nova retbazita kurso de instruista trejnado ĉe ‘edukado.net’ estos uzita por oferti dek stipendiojn de 100 eur por mildigi la kostojn de RITE por kandidatoj. Necesos konsenti, ke ILEI kaj RITE kunlaboros decidi pri la ricevontoj, necesos konsenti pri tempoperiodo por akcepti petojn kaj lanĉi tion.